# TAGIĜO

## ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

Aperas laŭbezone

Vol. 3

N-ro 2

Septembro 85

## NEŬTRALECO

Depost la unua Esperanto-kongreso en Bulonjo-sur-Maro ekzistas fundamenta miskompreno kaj misinterpretado de neŭtraleco de la Esperanto-movado.

Ĉar Zamenhof venis al Bulonjo ne nur kun ideo de Universala Lingvo sed ankaŭ kun ideo de Universala Religio ekestiĝis tiam mallonga bataleto pri interna ideo. Venkis tiam la ideo ke Esperanto estas nur lingvo kaj nenio alia. Ĝi estas neŭtrala nur pro tio ĉar ĝi apartenas al neniu nacio kaj ĉar ĝi ne fariĝis vehiklo sur kiu rajdas la Homaranismo. Zamenhof mem diris post Bulonjo ke Esperanto estas nur lingvo kaj nenio alia, kaj ke ĉiu persono kiu parolas ĝin estas Esperantisto, kaj ke ĉiu povas uzi la lingvon por kiu ajn celo.

Mi ne scias kial kaj depost kiam multaj Esperantistoj fariĝis mort-enue neŭtralaj kaj ili allogis al la movado aliajn senvivajn neŭtralulojn, kaj tra la mondo la Esperanto-rondetoj fariĝis cirkloj de nenion opiniantaj timemaj hometoj kiuj nur revis, kaj la neŭtraleco estis bona preteksto por fari nenion.

→

Kvankam mi ne estas religiema, tamen mi tre bedaŭras ke Homaranismo ne akceptiĝis en Bulonjo, ĉar se jes, UEA nun havus milionojn da membroj kaj ne 40000, ĉar la homa naturo estas tia ke li/ŝi estas pli laborema kaj malavara se temas pri la paradizo en la ĉielo ol la paradizo sur la tero. Ni vidas multajn religiajn sektojn kiuj estas absurdaj, sed ili tamen havas milionojn da adeptoj. Homaranismo certe havis pli valorajn ideojn ol la plejmulto el la ekzistantaj sektoj, kaj ĝi verŝajne kapablus kapti almenaŭ la saman nombron da ŝafoj kiel la aliaj. Nu, ni perdis tiun okazon, sed ĉu ni volas perdadi okazojn senfine ? Ĉu ni volas resti solaj en vakuo ĝis la fino de la mondo ? Ĉu ni revu pri mirakloj ĝis la morto ? Baldaŭ estos 100 jaroj de Esperanto. Tio estas longega tempo. Kaj la rezulto ? Miloj da Esperantistoj seniluziiĝis kaj mortis rezigne kaj amare.

Ni timas pri ĉio. Ni timas pri nia renomeo. Ĉu ni havas renomeon? Homoj eĉ ne scias ke ni ekzistas. Ni timas, ĉar kelkaj Esperantistoj marŝis inter 100000 pac-marŝantoj en Vankuvero. Nu, ĉu ni vivas en libera lando, aŭ ne? Ĉu la paco estas rubaĵvorto? Ĉu estas honte marŝi por la paco? Por kiu diablo ni bezonas Esperanton se ne por paco? Eble ni devus aboli ankaŭ la Semajnon de la Internacia Amikeco? ĉar ankaŭ ĝi estas politiko. Ĉu internacia amikeco ne estas danĝera ideo?

Eble kelkaj KEA*-anoj devus esti rememorigitaj pri nia himno La Espero, kiun verkis Zamenhof. Jen kelkaj strofoj el ĝi: "Sub la sankta signo de l' Esperanto, kolektiĝas pacaj batalantoj. Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos".

Mi esperas ke mi ĝisvivos la tempon kiam Esperantistoj fine komprenos ke Esperanto estas nur lingvo kaj ne iu senopinia-neŭtrala-esotera movado. Mi esperas ke iam tra Kanado floros aro de Esperanto-kluboj, tre diversaj, kaj tute ne neŭtralaj. Por ekzemple, ekzistos jenaj kluboj: 1. Liberala, 2. Konservativa, 3. Novdemokrata, 4. Komunista, 2.


[*KEA = Kanada Eo-Asocio - klarigo de EAB]

5. Kapitalista, 6. Ŝakludantoj, 7. Vegetarana, 8. Katolika, 9. Budista, kaj centoj da aliaj kluboj, kaj ni havos la saman elekton de kluboj laŭ nia ŝato kaj plaĉo kiel havas tiuj kiuj parolas la Anglan aŭ Francan.

Ĉu ĉiu Angle aŭ France-parolanto estas aŭtomate via amiko, ĉar li/ŝi parolas la saman lingvon kiel vi? Por ke ni havu agrablajn kaj interesajn interrilatojn Esperanto sola ne sufiĉas. Ni devas havi ankaŭ plurajn komunajn ecojn kaj interesojn. Dum mia 25 jara Esperantisteco mi vojaĝis kaj vivis en multaj landoj kaj mi apartenis al multaj Esperanto-kluboj. En ĉiu klubo ekzistis grupetoj kiuj tenis sin aparte kaj ne multe miksiĝis unu kun la alia. Por ekzemple, grupeto kun dekstraj politikaj inklinoj ne ŝatis miksiĝi kun la grupeto kiu havis maldekstrajn politikajn inklinojn. Pro tio ili kunvenadas nur unufoje monate, ĉar toleri unu la alian pli ofte estus al ili neeltenebla sufero. Kaj tiel la kluboj vegetas dum jardekoj kaj la klubanoj tamen kunvenas malgraŭ ĉio, ĉar ili diras ke ili estas ĝisostaj Esperantistoj kaj ke pro tio ili devas suferi por Esperanto. Ambaŭ grupetoj estus multe pli feliĉaj se ili povus aparteni al Esperanto-klubo de samopiniuloj. Estas ja homa naturo.

Kio estas neŭtraleco? Ekzistas du ĉefaj formoj de neŭtraleco: pasiva kaj aktiva. Kiel individuo, estas malfacile esti neŭtrala. Kiel asocio, oni povas esti pasive neŭtrala, kaj tiam via gazeto estos nelegebla pro malinteresa, griza kaj vakuosimila enhavo, aŭ ĝi povas esti aktive neŭtrala, kaj tiam via gazeto estos multkolora, multflanka, vivo-abunda kaj reflektos la vivon de multaj grupoj aktivaj en la plej vastaj kaj diversaj kampoj de homa aktiveco. Aktiva neŭtraleco estas simila al demokratio: ĉiu rajtas aktivi kaj krei laŭ sia inklino kaj ĉiu rajtas senpune publike esprimi sian opinion. La individuaj membroj rajtas fari tion, la kluboj rajtas fari tion kaj la Landa Asocio neniun el ili favoras aŭ malfavoras aŭ kondam

nas al silento. Tio estas la viva neŭtraleco kompare al morta neŭtraleco. Kaj se KEA volas havi pli ol 200 membrojn ĝi prefere elektu la aktivan neŭtralecon, ĉar se ĝi preferos la mortan neŭtralecon ĝi havos 200 membrojn ankaŭ post la jaro 2000. Esperantistoj forlasu viajn kaŝejojn! Iru tien kie la amasoj estas kaj trovu potencajn amikojn kaj aliancanojn.

Ĉar kelkaj Esperantistoj marŝas por la paco, iuj tuj ektimiĝas ke tio fortimigos iujn eventualajn futurajn kandidatojn por Esperantistigo. Nu, mi preferas perdi dekon de tiuj kiuj timas de ĉio, kaj gajni centon de tiuj kiuj timas de menio. Ĉu ne estas strange ke Esperantistoj ĉiam timas perdi tion kion ili ne havas ?

La Esperanto-movadoj en komunistaj landoj ne estas neŭtralaj. Ili ne povas esti neŭtralaj ĉar la politika sistemo tiea ne permesas tion. Tamen, tio ne malhelpas la progreson de Esperanto tie, kaj la Landaj Asocioj havas multe pli amasan kaj aktivan membraron tie ol en la okcidentaj landoj. En komunistaj landoj la politika sistemo ekspluatas Esperanton, kaj Esperanto ekspluatas la politikan sistemon. Ili ambaŭ formas simbiozan sistemon el kiu ĉiu profitas. Do, estas rimarkinda adaptiĝo de Esperantistoj al la sistemo. Ili ne havis alian elekton, ili devis adaptiĝi aŭ malaperi. Kial la okcidentaj Esperantistoj ne klopodas fari simbiozan sistemon inter siaj Asocioj kaj sia registaro ? Verŝajne ili timas eĉ de sia propra demokratia registaro. Ĉu la okcidentaj Esperantistoj kapablas presi ion similan al la "Hungara Vivo" aŭ "El Popola Ĉinio" ? Tute ne. Mankas ŝtata subvencio.

En 1962 mi partoprenis la landan Esperanto-kongreson en Jugoslavio, kiun partoprenis pli ol 800 Esperantistoj. Ĝi estis pli granda ol la Universala E-Kongreso en Vankuvero. Kiam mi partoprenas la KEA-kongresojn de 60-70 personoj mi ne scias ĉu mi ĝoju aŭ ĉu mi ploru. Kiam estis la komuna ELNA*kaj KEA kongreso en Milwaukee partoprenis ĝin



[*ELNA = Eo-Ligo de Nordameriko]

nur ĉirkaŭ 10 KEA-anoj. Ŝajnas ke la KEA-anoj estas tiom neŭtralaj ke ili timas eĉ komune kongresi kun la Usonaj gesamideanoj.

Ĉu UEA devas esti neŭtrala? Nepre jes, malgraŭ ke tio estas ege malfacila afero. Ĝi devas esti neŭtrala ĉar ĝi konsistas el Landaj Asocioj el komunistaj, kapitalistaj kaj evoluantaj landoj, kaj ofte ili ne estas neŭtralaj. Do, UEA devas havi spertajn diplomatojn kiuj kapablas teni la tre delikatan ekvilibron.

Fine, ni ĉiuj revas ke Esperanto per iu miraklo fariĝos lingvo de Unuiĝintaj Nacioj. Imagu ke tio okazos subite tre baldaŭ. Ĉu vi kredas, ke tiam la reprezentantoj de 150 landoj fariĝos anĝeloj kaj neŭtrale interdiskutados kaj kisos unu la alian? Se Esperanto eniros en la sferon de internacia politiko kaj ĝi fariĝos lingvo de politikaj bataloj ĉu ĝi ankoraŭ estos neŭtrala? Mi esperas ke tiam ĝi fine fariĝos lingvo kaj ne neŭtrala-esotera movado de timemuloj kaj revemuloj.

**Zoran Tuŝanov**

Se vi konsentas aŭ malkonsentas kun mi vi skribu al mi. Trovu mian adreson en la KEA membrolisto sub Brita Kolumbio. Se vi volas vi povas skribi Esperante, Angle aŭ France▲

[el ALUMETO, n-ro 11, Nov 84, informbulteno de Kanada Esperanto-Asocio]

Zoran Tuŝanov
109-1235 Nelson St.
Vancouver, B.C.
KANADO V6E 1J5

Evidente ke la situacio pri **neŭtraleco** raportita de Zoran Tuŝanov ne okazas nur en Kanado. En Brazilo la situacio estas la sama. Nia opinio estas, ke ni devas lerni ne timi la prezentadon de niaj vidpunktoj en la esperanta movado, pro neŭtralecaj motivoj. Kontraŭe, ni devas esprimi niajn ideojn, ne forlasante la respekton kiun meritas ĉiu individuo, malgraŭ tio, ke unu ne havas la saman opinion kiel la alia pri diversaj aferoj. Nur tiamaniere ni partoprenos en viva kaj interesa movado, kiu kapablos riĉigi ĉiujn partoprenantojn per multflankaj ideoj kaj spertoj. Sendu vian opinion por ke ni aperigu ĝin en TAGIĜO.

## 1º ENCONTRO DOS ESPERANTISTAS DO DISTRITO FEDERAL

Foi realizado no dia 31 de agosto de 1985 o Primeiro Encontro dos Esperantistas do Distrito Federal. Os objetivos do encontro, congregar os esperantistas locais e simpatizantes e apoiar a formação do Clube de Esperanto do Gama, foram plenamente atingidos.
Compareceram ao encontro (Centro Educacional nº 2, Gama, Setor Oeste), 130 pessoas. A grande maioria foi composta pelos estudantes do curso de Esperanto do CE-2, que fundaram o **GAMEK** (Gama Esperanto-Klubo), enquanto a população esperantista tradicional, ou seja, aqueles que de longa data são considerados esperantistas, foi uma minoria.

**Méritos** - um dos méritos do encontro foi a observância do horário/programa; a programação iniciou e terminou segundo o planejado, tendo apenas sido uma das palestras cancelada - A Juventude Esperantista Brasileira - e transferida para outra oportunidade, no GAMEK mesmo.

**Revelações** - descobrimos que a turma do Gama é talentosa! Há flautistas em profusão, (e eles realmente tocam!), o poema de Carlos Drummond de Andrade "Kaj nun Jozefo", foi declamado com perfeição e o grupo que encenou a peça Tonito, la elefanto, foi até convidado a apresentar a peça para os outros alunos do colégio.
Flávio Fonseca apresentou algumas músicas do disco a ser lançado ainda este ano, em Esperanto, é claro.

**Homenagem** - a professora Eponina Soares de C. Iqbel, diretora do Centro Educacional nº 2, foi homenageada com o título de Protetora do GAMEK, como agradecimento pelo apoio que tem prestado ao grupo.

**Livros como inscrição** - ao invés de se ter taxa de inscrição, solicitou-se a quem tivesse (e quisesse) a doação de um li-

vro em ou sobre o Esperanto para a biblioteca do GAMEK.

**Reunião da ABE com os líderes de grupos do DF** - Nessa reunião foi analisado o encontro e alguns aspectos do atual estágio do Esperanto no DF, como a necessidade de se encontrar informalmente outros esperantistas, levando amigos e familiares e a criação de um espaço esperantista na vida da cidade; a necessidade de termos um calendário de cursos onde conste todos os cursos a serem realizados no DF, para que todas as instituições possam informar com rapidez e facilidade aos interessados; as vantagens (divulgação e impacto junto à comunidade) de realizarmos conjuntamente as comemorações de eventos esperantistas; a necessidade de participarmos do momento de mudança a nível nacional do movimento esperantista, em relação a termos apenas uma entidade nacional (fusão Liga Brasileira de Esperanto e Conselho Brasileiro de Esperanto); a possibilidade de se organizar uma caravana para o 8º Congresso da Juventude Esperantista Brasileira (Porto Alegre, Janeiro de 86); a necessidade de se discutir o ensino do Esperanto no DF, o que decidiu-se realizar posteriormente. A partir daí chegou-se às decisões do encontro. Participaram da reunião: **Néia** - presidente da ABE, **José Alis** - presidente do GAMEK, **Lia** - diretora pedagógica do departamento de Esperanto da FEB, **Dorini** - professor de Esperanto da Comunhão Espírita de Brasília, **Josias** - diretor de ensino do GAMEK, **Flávio Fonseca** - professor de Esperanto do Departamento de Música da UnB (o curso não é oficial) e **Adolpho Miranda** - diretor do grupo Antaŭen.

**Decisões**

1) realizar o 2º Encontro dos Esperantistas do DF, em 1986;
2) realizar uma reunião informal, em local a ser escolhido (bar ou restaurante) no último sábado de cada mês;
3) listar todos os cursos de Esperanto que se realizarão no DF, a partir de 1986, para uso comum de todos os locais que ensinam o Esperanto;
4) comemoração conjunta dos principais eventos esperantistas.

## SIMPTOMOJ DE LA ESPERANTA MOVADO EN LA FEDERACIA DISTRIKTO

Ni profitis la 1-an Renkontiĝon de Esperantistoj de la Federacia Distrikto, por fari enketon inter la ĉeestantoj cele aktualigi la adresaron de EAB, scii kiuj el ili lernas Eon nuntempe, kie kaj kiu volas plu, aŭ ekde nun, ricevi informojn pri esperantaj aranĝoj.
Ĉeestis la renkontiĝon 130 homoj, kaj el ili, **83 respondis la enketon**.

### Analizo

* el la respondintoj (83), 23 jam faris kurson de Esperanto kaj el tiuj, 6 refaras kurson nuntempe;
* 51 faras kurson nuntempe kaj el ili 45 ĝin faras la unuan fojon;
* 29 ne faras kurson nuntempe kaj el ili 17 neniam faris Eo-kurson; el tiuj 17, 4 ne estas interesataj ricevi informojn pri esperantaj kursoj kaj aliaj aranĝoj.

### Konkludoj

La rezultoj de ĉi tiu enketo ne estas definitivaj, pro tio ke ĝi estis farita dum izolita situacio. Ni opinias, ke tiuj rezultoj ŝanĝiĝos tre frue, depende de la disvolviĝo de GAMEK (el kie venis la plimulto de homoj kiuj lernas Eon unuan fojon) kaj depende de multaj malnovaj esperantistoj kiuj tute forestas la esperantan vivon en nia urbo (ĉu al ili mankas intereso, ĉu la aranĝoj por ili estas seninteresaj?).

1) 60% de la respondintoj estas novaj en la movado, indikante tendencon al renoviĝo;
2) la kvanto de esperantistoj en la Federacia Distrikto pligrandiĝas;
3) la ĉeesto de malnovaj esperantistoj estis malaltega (26%) - domaĝe !
4) la ĉeesto de ne-esperantistoj estis signifa, ĉirkaŭ 20%;
5) nur 4,8% ne estas interesataj pri Esperanto - dank'al Dio !

# DIVULGAR O ESPERANTO ATRAVÉS DA MÚSICA !

Uma das maneiras de se utilizar o Esperanto é a música. Afinal, a música também é uma linguagem internacional e através dela manifestamos emoções, idéias, comportamentos.

Estando consciente das semelhanças entre o Esperanto e a Música, a Associação Brasiliense de Esperanto - ABE, está desenvolvendo um grande projeto de divulgação da Língua Internacional, por ocasião do Centenário da mesma.

A iniciativa consiste em lançar um disco de MPB atual, cantado em Esperanto, visando atingir principalmente o público ainda não-esperantista, através da TV e rádios FMs. Além disso, o disco conterá um encarte explicando, em português, numa linguagem moderna e direta, o que é o Esperanto e quais suas vantagens. Para a gravação foi convidado **FLÁVIO FONSECA**, cantor/compositor profissional, que já gravou outros discos e realizou shows por todo o País.

O projeto já está bastante adiantado, faltando apenas a prensagem do disco propriamente dito, mas o mesmo está sendo vendido antecipadamente desde o 21º Congresso Brasileiro de Esperanto, em Belo Horizonte.

Esperantistas de todo o País estão nos apoiando nesse trabalho, adquirindo discos e se tornando nossos revendedores. Obviamente o apoio de todos os esperantistas do DF é imprescindível !

Na venda antecipada, o comprador do disco recebe um cartaz impresso em verde, com texto bilíngüe, que representa a reserva do disco.

Estando o disco pronto, o que calculamos acontecerá no final deste ano, o comprador receberá o mesmo em casa ou na associação, sem maiores despesas.

## EAB EN LA 21-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 21-a Brazila Kongreso de Esperanto okazis en la urbo Belo Horizonte, de la 17-a ĝis la 21-a de julio pasinta.

Ĝin partoprenis 608 homoj el 18 brazilaj ŝtatoj. El la Federacia Distrikto enskribiĝis 33 homoj, sed ne ĉiuj ĉeestis; preskaŭ ĉiuj portis T-ĉemizojn kun la vortoj "Esperanto-Asocio de Brasília", donacitaj al ni de Elétrica Mercúrio.

Dum la malferma cerimonio, la aŭtoritatuloj montriĝis tre bone informitaj kaj favoraj al Esperanto. Post la solenaĵoj, Flávio Fonseca (el Brasília) prezentis spektaklon de brazilaj popularaj muzikoj, komponitaj de li. Ilin enhavos la disko baldaŭ lanĉota de EAB. La muzika prezentado estis multe aplaŭdita.

EAB disponigis al la ĉeestantoj giĉeton kun informoj pri la Kultura Semajno (kiu estis tuj poste okazonta), pri EAB mem kaj pri la urbo Brasília.

La prezidantino de EAB prezentis la prelegon "La disvastigado de Esperanto en la Federacia Distrikto - projekto kaj ĝisnunaj atingoj", kiu interesis la publikon; kopioj de la projekto estis disdonitaj al la interesatoj.

Okazis granda marŝado tra la urbocentro ĝis la placo Zamenhof. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 500 esperantistoj, svingante verdajn flagetojn kaj portante rubandojn pri Esperanto.

La ĵurnaloj, radio- kaj TV-stacioj multege informis pri la okazaĵo, ĉefe pri la marŝo kaj pri Flávio Fonseca, kiu ankaŭ prezentiĝis dum la vespera serenado ĉe placo Zamenhof.

* * *

## LIBROFOIRO ĈE **Praça dos Três Poderes**



Dum la Semajno del' Patrio okazis librofoiro de la Brazila Verkistaro, ĉe la Placo de Tri Povoj, kie Asocio de Bibliotekistoj de FD ankaŭ instalis sian budon. Ĉe tiu budo, EAB povis meti esperantajn librojn kaj disdoni informilojn pri Esperanto. Ĝenerale la foiro ne bone sukcesis, sed ni povis fari kontaktojn kaj paroli al diversaj verkistoj el la urbo pri Esperanto - konstatinte, ke en tiu medio Eo ne estas nekonata.




## En Brasília, Esperanto no rádio !

**Todos os sábados, às 15:00 h,** não deixem de ouvir a BRASÍLIA SUPER RÁDIO FM E ESTÉREO, pois estará no ar o programa "NOTICOJ PRI ESPERANTO - LA INTERNACIA LINGVO".

É um trabalho do grupo de divulgação da ABE.

---

No dia 1º de setembro, domingo, das 10:00 às 10:30 h, foi apresentado na mesma rádio um programa só com músicas em Esperanto. A programação foi composta de versões de músicas brasileiras, canções de Bob Dylan e canções líricas do cantor búlgaro Vaselin Damianov. Segundo informações da própria emissora, foram inúmeros os pedidos de informações e solicitações para que o programa fosse repetido.

---

## Ĉu la anoj de EAB ŝatas kabaredi?



Almenaŭ 30 homoj (el la 190 kiuj ricevis la inviton), tion ŝatas, ĉar ili venis al la asocio, je la 24-a de aŭgusto, ĉirkaŭ la 16:00 h, kaj la vespero estis tre agrabla !

Ni aŭdis muzikojn kantatajn de Flávio Fonseca, de Vaselin Damianov (estis nur sonbendo, komprenéble), Ĝanfranko, Suzana, Marĉela... ĉiuj esperantisto-kantistoj. Kelkaj homoj ludis la tre interesan (ĉu?!) ludon TELEGRAF, speciale menditan ĉe UEA, por distri niajn anojn, aliaj trinkis refreŝigaĵojn, manĝetis, kaj aliaj preferis brandaĵojn...

Nu, kiu venis, ĝuis. Kiu ne venis, atendu la venontan fojon !

---

**A T E N Ç Ã O** - informamos que todos os chamados telefônicos recebidos pela Aminda (a secretária eletrônica), são respondidos posteriormente.

Portanto, não hesite em deixar recados !

## 160.000 PASPORTOJ EN ESPERANTO !

"World Service Authority" estis fondita antaŭ 10 jaroj, en Basel, Svislando. Tiu entrepreno havas 50 membrojn tra 6 landoj: Mauritania, Alta Volta, Zâmbia, Equador, Kuweit kaj Yemen. Ĝi liveras pasportojn kontraŭ difinita sumo, al iu ajn civitano kiu tion mendas, krome, ĝi agnoskas al si la kreon de 'tutmonda registaro'.

Ĉiu pasporto estas presita en 7 lingvoj, nome: angla, franca, hispana, rusa, araba, germana kaj **Esperanta !**

Brazilano, lastatempe tre konata, s-ro Antônio Carlos Alves **Calvares**, implikita en kontrabando de valoraj ŝtonoj kaj mallicaj negocoj kune kun - laŭ ĵurnalaj raportoj - nia eks-ministro pri justico, aĉetis tiun specialan pasporton. Sed ĝi havas sur siaj paĝoj neniun stampon, vizpermeson, registron, ĉar laŭ klarigo de brazila diplomato, ĝi finfine havas nenian oficialan validecon.

Tamen, jen praktika kaj VASTA uzo de Esperanto, ĉar World Service, tre probable, liveras pli ol **16 mil pasportojn jare ! !**

[el Jornal de Brasília, paĝo 5, 29/08/85]

**HORÁRIO DE FUNCIONAMENTO DA SEDE**


| | |
|---|---|
| De 2ª à 6ª-feira ........ | 19:00-21:00 h |
| Sábado .................. | 09:00-17:00 h |
| Domingo ................. | Fechada |

# ĈU NI KONGRESOS ? ?



Ĉeesti kongresojn estas bonega maniero praktiki la lingvon kaj la socirilatojn, krom... **turismi** tra nia lando. Ni do ekprepariĝu por la kongresoj okazontaj **VENONTJARE:**

**BAKĤO** alvokas vin ! !



De la 20-a ĝis la 26-a de januaro 86
ni BEJK-os. La 8-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso okazos en Porto Alegre, RS! Laŭ onidiroj, januaro estas la plej trafa monato por viziti la sudan regionon. Porto Alegre, mirinda urbo, alvokas vin, ĉefe se al vi plaĉas vinbero kaj ĝia sankta suko (legu **vino**).
VENU KAJ ĜUU !
La kongresa temo rilatiĝas al ni ĉiuj:
**ESPERANTO KAJ LA TRIA MONDO.**

Vi, kiu neniam havis la bonŝancon vojaĝi eksterlanden, kiu neniam povis viziti Siberion kaj ĉirkaŭaĵojn, ne plu malĝoju pro tio:

venontan julion venu al

**C U R I T I B A**

koni la neĝon !!!

La **22-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO** okazos en tiu belega kaj ĉarma urbo, de la
**16-a** ĝis la **20-a de JULIO.**

La kongrestemo ?




**ESPERANTO KAJ SCIENCOJ !**

## NOVAJ LIBROJ AĈETEBLAJ ĈE EAB

Estis menditaj el Universala Esperanto-Asocio - UEA - kelkaj INTERESEGAJ libroj, kaj aĉeti ilin estas rajto de EAB-membroj. Tiuj, kiuj kutime vizitas la asocion jam aĉetis kelkajn, sed ankoraŭ restas ekzempleroj.

Titoloj:

- Faktoj kaj fantazioj (tre interesa, kaj bone rekomendita por perfektigo de la lingvo);
- Praktika bildvortaro de Esperanto (ilustrita, kolora, vortaro kiu instruas detaletojn!);
- Fundamento de Esperanto (ĉiu Esperantisto devas havi kaj trastudi ĝin).
- Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento (ĉu necesas komenti ĝin?).

Kaj riĉiĝas la biblioteko !

Novaj titoloj viĉiĝas ĉe nia biblioteko - se vi scivolas, venu kaj kontrolu !

## AMUZIĜI - rajto de ĉiu Esperantisto !

EAB konscias, ke la urbaj esperantistoj devas bone interrilatiĝi en amika etoso, krome, praktiki la lingvon !

Tial ni proponas, ke ni rendevuu **dum lasta sabato de ĉiu monato**, por amuziĝi, babili, diskuti aktualajn temojn, informiĝi pri nia internacia komunumo, trinki bieron, gvaranaon, manĝeti, kaj reĉerpi energiojn por daŭre labori aŭ amuziĝi pere de/por Esperanto ! La elektita loko: **restoracio PIZZAIOLO, CLS 310, ekde la 20:00 horo ! !**

## P R E L E G O J - por riĉigi niajn konojn

EAB programas diversajn prelegojn cele prezenti al la esperantistoj de la Federacia Distrikto, la eblecon diskuti diversajn kaj variajn temojn, ne nepre pri Esperanto aŭ pere de Esperantistoj.

La programo komenciĝos per la prelego **"Prevenção da perturbação emocional"**, prezentota de la Psikologo Nilson Ruiz Sanches, membro de EAB.
dato - 12 de oktobro, je la 20:00 horo.

Ni kalkulas je la ĉeesto de ĉiuj.

**DIVASTIGADO** - EAB prezentis prelegon pri Esperanto per diapozitivoj, en "Instituto de Idiomas Cambridge", Taguatinga. Ludimar gvidos Eo-kurson tie.

La unua renkontiĝo ĉe restoracia tablo jam okazis, la pasintan 28-an tagon de ĉi tiu monato. Aperis 27 homoj, inter ili 8 novuloj - ĉefe el Eo-grupo de Cruzeiro.
Ni ja amuziĝis, konis novajn personojn, babilis, **klaĉis**, kaj ankaŭ - por entute ne forgesi ĝin - parolis la portugalan lingvon!


MAL GRA SULO®
La ĈINAN?! Kiucele vi ler-
nas la ĉinan lingvon ?
REAGAN estas tute freneza! Li premos la butonon! La rusoj reagos !
Nur Ĉinio havas su-
fiĉajn atomprotek-
tilojn por POSTVIVI!